Gledhill, Christopher. 2001. Kial veraj sinonimoj ne ekzistas. *Esperanto en skotlando*. 2(2). 29-35. ISSN 1404-4709. **(PDF)**

# Kial Veraj Sinonimoj Ne Ekzistas

## 1. Enkonduko

Artikolo far Ed Robertson pri vortfarado ("Word formation in Esperanto") en *Esperanto en Skotlando* (2004 /1 :20-35) spronis min verki komenton pri paro da ekzemploj, kiujn li menciis. La celo de lia artikolo estis prezenti al lernantoj la esperantan sistemon de vortkombinado. Li traktis la richecon de la sistemo klarigante kelkajn teoriajn konceptojn, kies efikon oni ne povas preterlasi, se oni deziras plene posedi la lingvon. La intenco de mia artikolo ne estas rediri tion, sed aldoni kelkajn rimarkojn el vidpunkto de lingvistika teorio.

La ekzemploj, kiuj frapis min estis la paroj : *jarmilo / miljaro* kaj *meznokto / noktomezo*. Ed asertis, ke ambaw formoj estas akcepteblaj, ekvivalentaj al *millenium* kaj *midnight* en la angla. Oni povus supozi, ke 'logike' la paroj havus diferencon. Ekzemple, *jarmilo* egalus tipo de 'jaro', do 'dawro, milo da jaroj' kaj *miljaro* estus specifa dato 'jubileo celebranta mil jarojn'. Sed ni scias, ke lingvoj (neescepte esperanton) ne estas tiel logikaj aw simetriaj. Kaj Ed pravis, kiam pri la diferenco li demandis "chu gravas?" Tio estas ghuste la respondo adoptita en nia plej granda vortaro (PIV)[1] : *miljaro* estas simple menciita kiel arkaika formo de *jarmilo*. Mia demando estas, chu parolantoj vere uzas kaj interpretas tiajn similajn vortojn absolute same?

## 2. Sinonimoj kaj Strukturismo

En teoria vidpunkto, la distingo inter *jarmilo / miljaro* kaj *meznokto / noktomezo* estas tre interesa. Ekvivalentaj vortoj aw frazoj starigas problemon, char ili kontrawas unu el la plej fundamentaj ideoj de lingvistika teorio. La svisa lingvisto Ferdinand de Saussure[2] asertis, ke lingvo konsistas el sistemo, kie la valoro de chiu elemento dependas de ties pozicio relative al chiuj aliaj elementoj (chu vortoj, vorteroj aw sonoj). Lia kutima analogio estis shako: se oni movas aw forigas pecon dum la ludo, aw modifas regulon, tio havas konsekvencon pri la valoro kaj movebleco de la restantaj pecoj. Sekve multaj lingvistoj supozas, ke se ekzistas malsamaj formoj en iu lingvo, tiuj nepre ne povas esti ekvivalentaj. Do en teorio, simple ne povas ekzisti sininimoj, aw samsignifaj vortoj.

Se tio shajnas memevidenta, oni povas konsideri kroman konsekvencon de tiu teorio. En Francio, kie strukurismo (kiel tradicia jhazo) neniam eksmodighis, instruistoj pri la angla arde lernigas al studentoj fajnajn distingojn inter paroj kiel *He mustn't have done it / He can't have done it* (la unua frazo adoptus pli subjektivan vidpunkton). Fakte, mi dubas, ke francaj lernantoj multe profitas de tiaj klarigoj kaj mi sentas, ke la 'psikomekanika' tradicio ofte privilegias preskriban, bedawrinde elitan sintenon pri gramatiko kaj lingvo. Pli grava problemo por la teorio de Saussure, estas ke ghi ne facile povas klarigi novecon aw disvolvighon de senco. Ekzemple, mi lernis novan vorton en la menciita artikolo de Ed (*diafana* - travidebla sed ne transmovebla). Sed chu tio signifas, ke kiam mi lernis ghin, mia cerbo devis rearanghi la tutan leksikon de esperanto en mia kapo?

Tamen, mi ne sentas min komforta kun la aserto, ke du frazoj, aw vortoj estas 'egalvaloraj'. Multaj lingvistoj subtenas la gheneralan ideon de Saussure, kvankam ili ofte trovas, ke la strukturisma koncepto estas tro rigida por reprezenti la realecan de lingvo-uzado. En esperanto, ja ekzistas radikoj samsignifaj – ekzemple en PIV ni trovas *aklimatizi /*

[1] *Plena Ilustrita Vortaro* (red.) M. Duc-Goninaz, 2002,: Parizo, Sennacieca Asocio Tutmonda: p.496
[2] Fondinto de la skolo *strukturismo*.

*aklimatigi, emerito / pensiulo, tungsteno / volframo* ktp. Estas evidente, ke tiaj vortoj estas egalvaloraj por niaj chiutagaj kialoj, kvankam fakuloj eble povus distingi kelkajn nuancojn. Plie, nia vortaro estas plena je difinoj, kiuj ghuste dependas de tiu tipo de parafrazo. Kelkaj esperantistoj evidente troigas kiam ili asertas, ke nia lingvo enhavas neniujn sinonimojn. Tute kontraste, mi pensas, ke unu el la plej originaj ecoj de nia lingvo estas ghuste la bunta richeco de nia vortaro, la amaso da duoblajhoj kiuj reprezentas la multecon da manieroj, kiujn ni disponas por konstrui ideon. Tamen mi celas argumenti chi tie, ke kiam ekzistas du malsamaj vortoj aw frazoj, tiuj preskaw awtomate okupas malsamajn nichojn en nia lingva sistemo.

Georges Kleiber, konata kolego en Strasburgo verkanta pri semantiko[3], foje asertis ke vortostoko ne estas perfekta sistemo de sam-distance difinitaj vortoj, kovrante chiujn konceptojn kaj homajn sciojn. Anstatawe, lingvo posedas familiojn de vortoj, kiuj grupighas chirkaw kernaj terminoj, aw **prototipoj**. Ekzemple, en multaj socioj la morto estas kutime tabua temo, kaj lingvoj aludas ghin diversmaniere, chu per ewfemismoj (*forpasi, perdighi, perei, malnaski*) chu poeziaj parolturnoj aw montipitoneksaj parafrazoj (*perdi la vivigan sulkon, estingi sian kandelon, gluti sian naskigh-akton…*). Lingvo, kiel naturo, "malamas vakuon", kaj plenigas la spacojn inter ideoj per amaso da kromsignifaj nomoj parte tushantaj la kernan sencon, sed alportantaj ankaw aliajn nuancojn. Tiel la vortostoko rapide kreskas kaj plektighas chirkaw prototipoj.

Tial chiu lingvo havas tre richan vortostokon, kiel oni povas montri kiam oni konsideras kvazaw-sinonimajn parojn. En leksikologio, oni nomas vortoparojn kiuj konsistas el du malsamaj radikoj **alternantoj**, kiel *gazono / razeno* kaj parojn kies formo devenas de la sama fontlingvo **duoblajhoj**, kiel *cerbo / cerebro, konkurado / konkurenco,* kaj simile. Duoblajhojn kun simila sono, sed nesimila senco, oni nomas **paronimoj** : *agordi / akordi, benzeno / benzino, juro / jhuro, stamfi / stampi*. Kompreneble en esperanto, la plimulto de sinonimoj estas alternantoj inter radikoj kaj kunmetajhoj, kiuj ofte konkuras stilistike, ekz: *akromatopsia / kolorblinda, maldekstra / liva, trajno / vagonaro* ktp. Tiuj evidente kontribuas al pli detala, kontrastita vortaro. Evidente, tiaj similsignifaj vortoj estas pli oftaj ol oni ofte kredas.

## 3. Senco kontraw Efiko

Sed kio pri mia argumento? Mia punko estas, ke similsignifaj vortoj estas kontrasteblaj ne law **semantikaj** sed **pragmatikaj** kriterioj. Per tio mi celas, ke ech se la teknika senco de paro da vortoj afinas, ilia efiko en frazoj kaj esprimoj chiam malsimilas. El semantika, logika vidpunkto la senco de du similaj vortoj (duoblajhoj, alternantoj ktp.) korespondas al du malsamaj substrukturoj. Gramatikistoj emus diri, ke *jarmilo* estas tipa 'seria' kunmetajho[4]. Temas pri modifita tipo de kvanto, aw *milo da jaroj*. Dume, *miljaro* havus iel ne-antawvideblan sencon, almenaw se oni konsideras la internan ordon de ghiaj elementoj (ghi estas tipo de *jaro*, sed kial *miljaro* signifus 'jubilean celebradon' kaj ne 'periodo da mil jaroj'?). Law gramatika analizo *miljaro* estus 'paralela' kunmetajho, analoga al la frazoj *festo pri mil jaroj* / *miljara festo*. *Miljaro* havus do konvencian sencon, kiel la konata idiotismo *horlogho,* kies kutima senco ne estas rekte devinebla el kombinado de ties radikoj.

Do, de kie venas la sento, ke *jarmilo / miljaro* estas ekvivalentaj, t.e. samvaloraj, ech intershangheblaj? Fakte la semantikaj kaj gramatikaj trajtoj, kiujn mi menciis supre ne helpas nin. La problemo kun tia tipo de argumento estas, kiel dirus Pierre Frath, mia kolego en Strasburgo, 'nia kompreno ne estas rezulto de iu ajn kalkulado'. Eble pli ghustas diri, ke kunmetado de elementoj faras la duonon de nia komunika laboro, kaj la duan parton faras nia rilato kun la kunparolanto aw leganto, je kiu ni povas atendi kunlaboremon por sukcesa komunikado (tio estis la tezo de la filozofo H. P. Grice). Tio signifas, ke ni devas taksi ambaw

[3] G. Kleiber 1990, *La Sémantique du prototype,* Parizo: Presses universitaires françaises.
[4] Kiel mi diskutis en Gledhill, 2000, *The Grammar of Esperanto,* Munkeno: Lincom Europa, p.66-9.

vortojn en kompleta konteksto. Ekzemple, kiam ni kontrastas la frazojn *Ni festis la jarmilon en Edinburgo / Ni festis la miljaron en Edinburgo*, estus malghuste interpreti ilin kun du apartaj sencoj. Ni komprenas ambaw simile, char ne ekzistas en la reala mondo alia interpreto koherenca. Ne vere estas grave, ke la unua frazo eble prezentas vidpunkton pri la pasinta jarmilo. Pli gravas, ke *fino de jaro* estas kazo de celebrado en nia kalendarema kulturo. Tute egalas do chu temas pri *jarmilo* aw *miljaro*, kiuj ambaw rilatas, sed nur en tiu chi konteksto, al iu celebrinda datreveno. Notu, ke nia interpreto ne devas egali la vortaran difinon, sed nur bezonas kongrui kun la specifa konteksto kiun mi aludis. Alidire, la senco ne gravas; nur la efiko. Chu ne metaforoj efektive funckias tiel? Konklude, logiko kaj semantiko ne chiam determinas la signifon de esprimo.

## 4. Korpuso kaj Konkordanco

Mi nun turnighas al la egale interesa paro *meznokto / noktomezo*. Ed prave diris, ke ili estas pli-malpli egalvaloraj. Rigardante la substrukturon de tiuj vortoj, oni povus chikane argumenti, ke en *noktomezo*, *nokto* modifas *mezon* en seria kumetajho. Tio signifus la horon notitan per arabaj ciferoj 00h00 de la 24-hora horlogho. Simile al *miljaro*, la rilato inter *mez-* kaj *nokto* estus esence morfologia, kreante leksikan unuon. Tiel, *mez-* rolas kiel prefikso signifanta centran situon, kiel en *mezepoko, Mez-Ewropo, mezokarpo* ktp. En teorio, *meznokto* kontraste al *noktomezo* signifus 'iam dum la (malfrua) nokto'. Kompreneble, oni rajtas scivoli, chu parolantoj vere konsideras, ke en chi-tiu okazo ni havas du malsamajn vortojn, aw chu tiuj estas intershangheblaj.

Uzante komputilajn metodojn, lingvistoj nun disponas precizan manieron por testi tion. Por vidi la diferencon inter du vortoj, oni povas studi ties frazeologion[5], kiam unu vorto afinas kun aliaj vortoj en frazoj. Por studi tion, oni povas serchi multajn awtentajn ekzemplojn cherpitajn el la inter-reto, ekzemple la retejo 'WebCorp'[6]. Se oni tajpas *meznokt* aw *noktomez* la programo povas listigi chiujn variojn de la vortoj el la esperantista ret-tekstaro ekz. : *meznokte / meznoktan / meznokton* kune kun la konteksto. En lingvistiko la rezultanta ekzemplaro nomighas 'konkordanco'[7].

Esplorado korpusa (aw 'tekstara', se vi preferas la Fundamentan version) ofte sugestas la relativan gravecon de vorto, kaj tuj indikas ghian distribuon. En nia kazo, *noktomezo* estas kvaroble pli ofta ol *meznokto*. Notu, ke char vorto okazas en specifa frazo, ni parolas pri 'frazeologia' diferenco. Tiel la plej ofta formo, *noktomezo* (809 ekzemploj) plej ofte okazas kun prepozicioj, en tempaj frazoj kun *je*, aw kun la artikolo *la* signifanta 'apartan momenton':

1. La tago, en kiu la luno tute ne videblas, estis difinita kiel la unua tago de la monato, kaj la nova jaro komencighas <u>de</u> <u>la</u> **noktomezo** de la unua tago de la ...
2. Marso subiras <u>ĉirkaŭ</u> **noktomezo**. ... Jupitero leviĝas <u>ĉirkaŭ</u> **noktomezo** kaj altas dum la matena eklumo....
3. Ni imagu, ke la idaro de unu bakterio, tagmeze metita en la kultiv-medio, finsaturos la skatolon <u>je</u> **noktomezo** : ene de tiu tempo la nombro de la bakterioj ...
4. "<u>Je</u> **noktomezo** mi vekos vin kaj vi povos vigli dum mi dormos". ... "Bonan nokton, Tomaso. Veku min je noktomezo".
5. La partoj de la tago estas: mateno,antaŭtagmezo, tagmezo, posttagmezo kaj vespero; <u>je</u> la dudek-kvara horo estas **noktomezo**. ...

Kontraste, la poezia formo *noktomez'* (nur 20 ekzemploj) estas pli svaga, kaj fakte ne indikas

---

[5] Por klarigo pri frazeologio oni nepre legu Sabine Fielder, 2002, *Frazeologio en Esperanto*, Roterdamo: UEA.
[6] WebCorp = Retkorpuso, disponebla che <u>www.webcorp.org.uk</u>. La avantagho de tia serchilo super Google estas, ke ghi forigas la samajn ekzemplojn konkordanco.
[7] La termino *konkordanco* ne estas komputika barbarismo sed 'kvazaw-fundamenta', char filologoj uzis ghin por siaj permane prezentitaj listoj, inkluzive Zamenhofo por sia 'ekzemplaro' da proverboj kaj idiotismoj.

precize *je la noktomezo*. Ghi nur signas punkon meze de la nokto, post kiam io komencighas:

1. Venu je **noktomez'**, je dua hor', dormas paĉjo, dormas panjo, mi dormas for. Frapu al ĉambropord'…
2. Gardu vin, ho mortemul', revenos mi je **noktomez'** vendrede la dektrian ĉi-monate! ...
3. Kia lerteco! Homoj kriaĉas. Miras pri ili natur', Penas kompreni. Plena silento venis post la **noktomez'**. Ĝuas la tero.
4. Sed tre timeble vi je **noktomez'** kaj pensos pri alia viro...
5. Nigras pro maldormo kvazau **noktomez'**…

La adverba formo *noktomeze* (kun 283 ekzemploj) estas foje preciza, foje ne. Ghi signas komencan momenton aw agadon 'meze de la nokto' :

1. Edzino vekighis **noktomeze** kaj ne vidis la edzon apud si.
2. **Noktomeze** preteriros ĉi tie veturilo, kiu prenos kaj veturigos nin ĝis la limo de tiu feliĉega lando
3. **Noktomeze** ĉe la tombejo, du skeletoj staras por batalo ...kiu venkos, ĉu vi aŭ la alia skeleto?
4. Kaj laux miaj prapatraj kredoj kaj kutimoj, estas bonega signo kiam oni naskigxas **noktomeze**. ...
5. "Mia vaĉo komenciĝos **noktomeze**. Noktomeze ĝis la kvara.".

Dum *noktomezo / noktomeze* signifas punktan momenton aw tempan limon, *meznokto / meznokte* signas dawron aw periodon antaw la mateno kontraste al la tago. Per *meznokto* (240 ekzemploj, kaj *meznokt'* nur 9) oni priskibantas la etoson, bruon, lumon kaj mallumon de la nokto. Estas ankaw tendenco priskribi la nokton per adjektiva formo, kiel en ekzemploj unu kaj du:

1. Ekster la fenestroj sporade glimis kelkaj steloj sur la frosta kaj malhele blua ĉielo. Ne povis esti, ke iu frapas je la pordo en tiel profunda **meznokto**. ...
2. Pri la libro Carlo Minnaja en Heroldo de Esperanto skribis: "**Meznokto** metropola estas juvelo". ...
3. Povis esti proksimume **meznokto**, kiam lin vekis ia brueto, simila al paŝetado de musoj surplanke. Ni vidu, diris ...
4. Ni ankaŭ nomigas ĝin la "Dua laboralterno." La "Graveyard Shift" ["Tombeja" laboralterno] laboras de **meznokto** ĝis la mateno. ...
5. Ĉi-palecon kutime havas personoj, kies labortago ne estas reglamentita kaj tre ofte finiĝas post **meznokto**, kiuj ne havas tempon kaj monon, por sporti, kiuj ...

La adverbo *meznokte* (kun 70 ekzemploj) signifas plimulte 'dum la nokto / frua mateno', kvazaw en esperanto oni dirus 'dumnokte'. Oni kontrastas ghin kun *noktomeze* rimarkante la afinon de *meznokte* kun bruoj, lumoj kaj maldormado :

1. ... drinkis ĉampanon, auskultis la antaunovjaran diskurson de la Prezidento, eksplodis petardojn, kaj rigardis la noktan salutan pafadon je la tria horo **meznokte**! ...
2. Nepre kaptu la okazon paroli nian lingvon; malofte oni povas paroli Esperanton de unua taglumo gxis enlitigxo, kaj ecx **meznokte**!
3. **Meznokte**, gejunuloj venas en la monton, kie ili plukis tefoliojn tage, kaj kantas pri sia amo ghis tagigho.
4. **Meznokte** tede bruadis pluvo,matene la ĉielo nubozis kaj mi iom da morozo. Mi ĵetis rigardon ekster la fenestron kaj rimarkis, ke la blanka lotusfloro jam ...
5. Minaco pri la ursoj malaperigis mian ideon pri urinado kaj min ekdormigis. Eble je la tria **meznokte**, la bruo en la kampadejo min vekis. ...

Kio estas fine la diferenco inter *noktomezo / meznokto*? *Noktomezo* ofte indikas dividan horon de la horlogho. Sed ghi ne estas preciza: kiel adverbo *noktomeze* ofte signifas neprecizan punkton post kiam io okazas. Kontraste, *meznokto / meznokt' / meznokte* ghenerale indikas

periodon antaw la mateno. La adverbo *meznokte* distingeblas pro la senco de ‘dumnokta interrompo’. Tiaj diferencoj nur estas parte antawvideblj de nia seria regulo, kaj la regulo ne antawvidas chion. La regulo ne vere klarigas kial unu vorto signifas ‘punkto dum de la nokto’, kaj la alia ‘periodo antaw la mateno’. Kaj la reguloj nenion diras kial unu estas termino de mesuro kaj la alia objekto de priskribo. Eble la vera distingo venas de la fakto, ke en esperanto ni kontrastas *noktomezo / meznokto*, sed ne *tagmezo / meztago.* Evento, kiu rompas la nokton estas pli grava ol evento kiu okazas ‘meztage / dum la tago’ (ni ne ech bezonas rimarki tion). Ni do ne bezonas esprimon kiel *meztage*, kaj nur kutime uzas *tagmeze* por indiki gravan pawzan momenton dum nia labortago.

## 5. Konkludo

Resume, sinonimoj ne ekzistas char homoj ne uzas vortojn izole, sed en kompletaj frazoj kaj konkretaj kontekstoj. En vivanta fluanta lingvo, vortoj kaj vorteroj ekzistas en frazeologia ‘bano’ kaj ili tuj adaptighas kaj kunfandighas al novaj kuntekstoj kaj kontekstoj. Do la senco de iu ajn kunmetajho ne povas esti la sumo de ties partoj. La partoj evidente kontribuas, sed reale nur rolas kiel nekompletaj spuroj. La semantika similo aw malsimilo de du vortoj tute dependas de la realmonda referenco de la vorto kaj de la komunika konteksto, kiel montras la paro *miljaro / jarmilo*. Simile, oni nur povas apartigi du similajn vortojn kiel *noktomezo / meznokto* kiam oni konsideras ties kontekstojn. Oni povas sammaniere apartigi aliajn parojn (*peni / klopodi*, *persvadi / konkvinki*, *ighi / estighi / farighi*), kiel mi efektive montris en mia libro. Sed chu oni povus establi tiujn diferencojn rigardante nur la difinojn de vortaro, aw demandante al parolantoj, kio estas la diferenco? Vershajne ne. Tiaj diferencoj nek ekzistas en vortaroj nek en gramatikoj. Tiajn informojn nur duon-scias ech fluaj parolantoj kaj verkistoj, kiuj devas retrovi kaj eltrovi la frazeologiajn profilojn de siaj vortoj, chiam kiam ili re-legas kaj re-verkas en la lingvo.

Christopher GLEDHILL
(Universitato Marc Bloch, Strasburgo)